Sankta Meso, Vendredo de la 6a Paska Semajno
18an de majo 2007a

Unua legaĵo - Ago 18, 9-18 (el la Agoj de la Apostoloj)

La Sinjoro diris per vizio nokte al Paŭlo: Ne timu, sed parolu, kaj ne silentu; ĉar mi estas kun vi, kaj neniu vin atakos, por fari al vi malbonon; ĉar mi havas multe da homoj en ĉi tiu urbo. Kaj li loĝis tie jaron kaj ses monatojn, instruante inter ili la vorton de Dio. Sed kiam Galiono estis prokonsulo de la Aĥaja lando, la Judoj leviĝis unuanime kontraŭ Paŭlo, kaj kondukis lin al la tribunala seĝo, dirante: Kontraŭ la leĝo ĉi tiu instigas homojn adori Dion. Sed kiam Paŭlo estis malfermonta la buŝon, Galiono diris al la Judoj: Se vere tio estus ia maljustaĵo aŭ malbonega kanajlaĵo, ho Judoj, estus racie, ke mi vin toleru; sed se prezentiĝas demandoj pri vortoj kaj nomoj kaj via propra leĝo, vi mem ĝin atentu; pri tiaj aferoj mi ne volas esti juĝanto. Kaj li forpelis ilin de la tribunala seĝo. Kaj ili ĉiuj ekkaptis Sosteneson, la sinagogestron, kaj batis lin antaŭ la tribunala seĝo. Kaj Galiono atentis nenion el tio. Kaj Paŭlo, restinte post tio ankoraŭ dum multe da tagoj, adiaŭis la fratojn, kaj de tie ŝipiris al Sirio, kaj kun li Priskila kaj Akvila; sed li razis sian kapon en Kenkrea, ĉar li faris sanktan promeson.

Responsoria Psalmo (Psa 47, 2-10)

La Reĝo de l'universo, jen Dio!

Ĉiuj popoloj, plaŭdu per la manoj,
Kriu al Dio per voĉo de kanto.
Ĉar la Eternulo Plejalta estas timinda;
Li estas granda Reĝo super la tuta tero.
Dio supreniras ĉe sonoj de ĝojo,
La Eternulo ĉe trumpetado.
Kantu al Dio, kantu!
Kantu al nia Reĝo, kantu!
Ĉar Dio estas la Reĝo de la tuta tero:
Kantu edifan kanton!
Dio reĝas super la popoloj;
Dio sidas sur Sia sankta trono.

Evangelio - Joh 16, 20-23 (el la Evangelio laŭ sankta Johano)

Kiam Jesuo transiris de ĉi tiu mondo al la Patro, li diris al siaj disĉiploj: Vere, vere, mi diras al vi, ke vi ploros kaj lamentos, sed la mondo ĝojos; vi estos malĝojaj, sed via malĝojo fariĝos ĝojo. Virino, kiam ŝi akuŝas, havas malĝojon, ĉar ŝia horo venis; sed kiam ŝi naskis la infaneton, ŝi jam ne memoras sian doloregon, pro ĝojo, ĉar homo naskiĝis en la mondon. Vi do ankaŭ havas nun malĝojon; sed mi revidos vin, kaj via koro ĝojos, kaj neniu forprenos de vi vian ĝojon. Kaj en tiu tago vi demandos min pri nenio.

Sankta Meso, Sabato de la 6a Paska Semajno
19an de majo 2007a

Resuma preĝo

Antaŭ ol iri apud Vin, Patro nia, via Filo promesis al la Apostoloj la Sanktan Spiriton; ili ricevis de Vi sennombrajn gracojn, kiuj konigis al ili la aĵojn de supre; disverŝu nun sur nin la samajn donacojn de la Spirito. Per nia Sinjoro Jesuo Kristo, via Filo, kiu vivas kaj regas kun Vi en unueco kun la Sankta Spirito, Dio en ĉiuj jarcentoj.

Unua legaĵo - Ago 18, 23-28 (el la Agoj de la Apostoloj)

Pasiginte iom da tempo en Antioĥia, Paŭlo foriris, kaj trapasis laŭvice la Galatujan kaj Frigian regionon, fortikigante ĉiujn disĉiplojn. Kaj unu Judo, nomata Apolos, Aleksandriano laŭ gento, viro klera, venis al Efeso; kaj li estis potenca en la Skriboj. Ĉi tiu jam estis instruita pri la vojo de la Sinjoro; kaj estante fervora en spirito, li paroladis kaj instruadis precize pri Jesuo, konante nur la bapton de Johano; kaj li komencis paroli sentime en la sinagogo. Sed Akvila kaj Priskila, aŭdinte lin, alprenis lin al si, kaj klarigis al li pli precize la vojon de Dio. Kaj kiam li volis transiri en la Aĥajan landon, la fratoj kuraĝigis lin, kaj skribis al la disĉiploj, ke ili akceptu lin; kaj alveninte, li multe helpis tiujn, kiuj kredis per graco; ĉar konvinke li refutis la Judojn publike, pruvante per la Skriboj, ke Jesuo estas la Kristo.

Responsoria Psalmo (Psa 47, 2-10)

La Reĝo de l'universo, jen Dio!

Ĉiuj popoloj, plaŭdu per la manoj,
Kriu al Dio per voĉo de kanto.
Ĉar la Eternulo Plejalta estas timinda;
Li estas granda Reĝo super la tuta tero.
Dio supreniras ĉe sonoj de ĝojo,
La Eternulo ĉe trumpetado.
Kantu al Dio, kantu!
Kantu al nia Reĝo, kantu!
Ĉar Dio estas la Reĝo de la tuta tero:
Kantu edifan kanton!
Dio reĝas super la popoloj;
Dio sidas sur Sia sankta trono.

Haleluja. Haleluja. Sendita de la Patro, Kristo venis en la mondon. Nun, li lasas la mondon por iri al la Patro. (laŭ Joh 16, 28) **Haleluja.**

Evangelio (Joh 16, 23-28) (el la Evangelio laŭ sankta Johano)

Kiam Jesuo transiris de ĉi tiu mondo al la Patro, li diris al siaj disĉiploj: Vere, vere, mi diras al vi, se vi petos ion de la Patro, Li donos ĝin al vi en mia nomo. Ĝis nun vi petis nenion en mia nomo; petu, kaj vi ricevos, por ke via ĝojo estu plena. Ĉi tion mi parolis al vi alegorie; sed venas la horo, kiam mi jam ne parolos al vi alegorie, sed anoncos al vi malkaŝe pri la Patro. En tiu tago vi petos en mia nomo; kaj mi ne diras, ke mi petos de la Patro pro vi; ĉar la Patro mem vin amas tial, ke vi min amis, kaj kredis, ke mi elvenis de Dio. Mi elvenis de la Patro, kaj alvenis en la mondon; denove mi lasas la mondon, kaj iras al la Patro.